



Jura Semajno

Semajna bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Junio : 1 2022

PUNAJ DAMAĜOJ EN LA PROCESO DEPP KONTRAŬ HEARD

Sufiĉe diskonigita estas la ĵusa juĝa decido en la proceso de la aktoro Johnny Depp kontraŭ lia eks-edzino Amber Heard. La proceso komenciĝis kiam la ĉefrolulo de filmoj kiel “Piratoj de la Karibio” denunciis sian eks-edzinon pro la publikigo de informo en la usona ĵurnalo *The Washington Post*, tie ŝi akuzis lin pri hejma perforto. La jura proceso ĵus finiĝis per kondamno al ambaŭ partioj. Depp devos pagi al Amber Heard 2 milionojn da dolaroj kaj Heard devos mon-kompensi al Depp per 15 milionoj.

Elstarinda estas la fakto, ke la mon-kompensado pagota de S-ino Heard, siafoje, dividiĝas en 10 milionoj kiel pago de kompensado pro la damaĝoj suferigitaj, plus 5 milionoj kiel punaj damaĝoj. Do, kio estas la punaj damaĝoj?

Oni povas diri, ke punaj damaĝoj estas plia paŝo okaze de kompensado pro la damaĝoj suferigitaj. Temas pri kondamno al kulpulo se oni juĝis, ke li agadis neglekteme, senatente aŭ misintence. Tiel, ekzistas punindaj agoj, kiuj ne povas esti punigitaj nur



Johnny Depp kaj Amber Heard

pere de mon-kompensado de la damaĝoj suferigitaj, sed ankaŭ per kroma mon-puno pro la forta socia rifuzo kiun meritas tiu ago. Do, en la kazo de Depp kontraŭ Heard, la mono kiun ŝi devos pagi, estas formita de:

- 10 milionoj da dolaroj kiel reparacio pro la damaĝoj aŭ molestoj kaŭzitaĵ, okaze de la publikigo de artikolo kaj misakuzo de hejmaj perfortoĵ.
- 5 milionoj, pro la fakto, ke ŝi faris tion misintence.

Ĉu ekzistas limoj por tiuj punaj damaĝoj? Jes, sed kompreneble tiuj limoj estas malsimilaj laŭ ĉiu nacia leĝaro. Tiel, ekzemple, en la leĝoj de la usona ŝtato Teksaso ekzistas limo

difinita en 750.000 dolaroj. Alfoje, kompenso pro punaj damaĝoj neniam tiu limo ne estas ekzakte kalkulita, povus esti pli alta ol tiu difinita kiel male ĝi dependas de la mon-kompenso reparacio pro la damaĝoj suferigitaj, de la reparacio. Tiel, en Kolombio la ĉar tio povus kaŭzi ne-ĝustan Konstitucia Kortumo deklaris, ke la enriĉigon de la viktimo.

Vorto de la Semajno

Asembleo: Ĉefa interkonsiliĝa aŭ decida organo, precipe sur nivelo ŝtata aŭ interŝtata.

Asembleano, assembleisto: Membro de asembleo.

Sinonimoj: *parlamento, kongreso, renkontiĝo.*



De la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto okazos en la kanada urbo Montrealo la 107-a Universala Kongreso de Esperanto. Kadre de ĝi devos okazi la ĝenerala asembleo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio. Se Vi estas membro aŭ simpatianto de nia asocio, bv. anonci vian partoprenon. Dankon!

